

Bulgaria ESPERANTISTO



E N H A V O

* * *	Al la tutmonda esperantistaro . . .	1	* * *	64-a UK de Esperanto	7
* * *	Leteroj de amikoj (de D. Cibulevskij, L. Karlovics)	2		Gevork Gevorkjan. Amas mi	8
	Organiza vivo. Solena malfermo de la nova lernojaro. Kunveno pri L. Tolstoj	3		S. N. Podkaminer. La Oktobra Revolucio kaj la rusa E-movado	8
	Cvjatko Todorov. Multjara amikeco . . .	3	* * *	Konstitucio de USSR	11
* * *	Amikeckontrakto inter Târgoviște kaj Eger	3		Sergej Krajnov. Riĉenliava almanako . .	12
* * *	Dankletero de „Narkoop“-Kubrat . . .	4		T. Bercis. E-novaĵoj el Latvio	13
	Dimitro Mutuŝev. La Centra Kooperativa Unuiĝo sur internacia tereno	4		Ernő Csiszar. Pri renkontiĝo de E-familioj	14
	Ŝiŝman Boĉev. Ĉu 100 lernohoroj sufiĉas?	5		Michael Lennartz. Letero al la redakcio	14
	Dao Anh Kha. Vojaĝnotoj lige kun la 63-a	6		Veselin Hanĉev. Kanto pri la patrolando. Traduko de S. mananda	15
				Maria Vakaŝinska. Perditulino	15
			* * *	Ŝtona Arbaro.	16
			* * *	Deziras korespondi	16

Sur la kovrilpaĝo :

Abundas je fruktoj la bulgara tero

Redakta komitato :

Kunĉo VALEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĂCEV, Ljuba BOJAĜIEVA, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krăstu KARUCIN, Haim LEVI.

Abonkotizo de „Bulgara Esperantisto“ nur jara: por Bulgario — 2 levoj, por socialisma landoj — 3,80 levoj, por ĉiuj ceteraj — 4,16 levoj aŭ egalvaloro.]

Korektis: **Rajna Konstantinova**
Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29



AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

En 1975 la Monda Packonsilantaro (MPK) publikigis novan „Stokholm-alvokon“, kies tekston ni sendis al 115 naciaj kaj internaciaj esperantistaj organizoj kaj gazetoj kun nia propra komento. Tiu alvoko vekis grandan eĥon tra la tuta mondo kaj jam ricevis pli ol 400 milionojn da subskriboj. Tamen ŝajnas, ke granda plimulto de la esperantistaj asocioj kaj gazetoj ĝenerale ignoris ĝin.

Ni perfekte komprenas, ke ĉiu esperantista asocio havas siajn proprajn celojn kaj problemojn. Krome multaj volas nepre observi la principon de politika neŭtraleco por ne ĝeni poresperantan agadon en ĉiuj medioj. Ankaŭ certe ne mankas samideanoj, kiuj vidas en la pacbatalo kaj en MPK ian komunistan kaptilon, aŭ simple opinias, ke tiaj iniciatoj ne povas haltigi la vetarmadon, aŭ kutimigis al la nova vivo, sub minaco de nova katastrofo, kvazaŭ tio estas neevitebla.

Al tiuj objetoj ni povas koncize respondi:

1. Se neŭtraleco pri politikaj aferoj estas en iuj kondiĉoj komprenebla, neŭtraleco pri paco kaj milito signifas neŭtralecon pri vivo kaj morto. Ĉu tio estas imagebla, des pli kiam oni deklaras sin heredanto de d-ro Zamenhof, arda apostolo de la paco? Ĉu tia abdiko pri nia respondeco estas inda je homa estaĵo?

2. Nova mondmilito estus katastrofa por la tuta mondo kaj milfoje pli ruiniga ol ĉiuj antaŭaj konfliktoj. Paca kunvivado inter ladnoj kun malsamaj reĝimoj estas do absolute necesa, kio postulas haltigon de la vetarmado. La romkatolika religio kondamnas ĝin. Tio certe ne estas rezulto de „komunista“ intrigo, sed de serioza analizo de la situacio kaj ties eblaj konsekvencoj. Kial la esperantista movado ne farus similan analizon?

3. La vetarmado ĉiam kondukis en la pasinto al milito. Silenti signifas akcepti. Kaj akcepti tiun politikon signifas permesi militon, frue-malfrue, kiu detruos nin aŭ niajn idojn. Ni turnas nin al via konscienco: ĉu vi pretas supporti tiun teruran respondecon?

4. Ni ne postulas, ke vi konsentu pri ĉiuj analizoj kaj pozicioj de Monda Packonsilantaro kaj de MEM. Ni simple proponas al la tuta esperantistaro postuli ĉesigon de la vetarmado, ĝeneralan simltanan kaj kontrolatan malarmadon kaj pacan kunvivadon fare de ĉiuj registaroj senescepte. Ĉu eblas fari pli saĝan kaj pli realisman proponon, kaj kiu povas malkonsenti?

Neniu registaro povas militi sen la konsento de sia popolo. Ni vivas en epoko, kiam la popoloj povas trudi sian volon, kaj ĉio dependas de ilia agado. La esperantistoj vivas sur nia terglobo kaj estas koncernataj kiel ĉiuj aliaj homoj.

5. Nun prezidento J. Carter (Karter) volas konstrui novajn terurajn armi

lojn, notinde la abomenan, satanan neŭtronbombon, kiu detruus ĉian vivon kaj ne difektus la konstruaĵojn, uzinojn kaj materialojn. Li tiel endangerigas la vivon de la tuta homaro, relanĉas la vetarmadon, kaj neniu preteksto povas pravigi tiun akcelon de la kurado al morto.

Ni solene petas la tutan esperantistaron tuj agadi, kune kun ĉiuj pac-amantoj en la tuta mondo, por ĉesigi tian frenezajon kaj postuli politikon de malarmado kaj paca kunvivado. La nuna situacio estas tro grava kaj tro danĝera por plue silenti!

Praktikaj konsiloj:

Ni konsilas al vi kunlabori kun aliaj pacorganizoj, kaj notinde kun la t. n. „pacmovado“.

Vi povas turni vin al la Monda Packonsilantaro, Lönnrotink, 25A., 6. krs. Helsinki 18, Finnlando, aŭ al nia movado (MEM): W. Gilbert, ĝenerala sekretario, 30 rue Croix Montoire, 37100 Tours, Francio.

SEKRETARIATO DE MEM

Leteroj de amikoj

Karaj bulgaraj geamikoj,

Antaŭ du jaroj, en 1976, kiam en u. Ruse okazis la 39-a Kongreso de la bulgaraj e-istoj, mi havis la eblecon en la grupo de sovetlandaj e-istoj viziti vian beleĝan landon. Evidentiĝis, ke tiu dusemajna vojaĝo tute ne sufiĉas por bone ekkoni la malgrandan, sed historie riĉegan landon kaj ĝian popolon, kaj mi decidis nepre denove partopreni ekskurson al ĝi.

Kaj jen: nova neforgesebla evento en la E-vivo de Bulgario — la 63-a UK de E-o en la belega urbo Varno, kiun oni ne vane nomas „Perlo de Nigra Maro“. Mi decidis partopreni ĝin. Plezure mi denove promenadis tra la stratoj de Sofio, Plovdiv, Ruse, Veliko Tŕrnovo, Varno, Gabrovo. Aparte impresis min la etnografia muzeo en Gabrovo, la ripozdomoj kaj hoteloj de „Albena“ (vere, ĉiu el ili estas arkitektura miraklo!), la paradiza urbeto Etropole. . .

Nun, hejme, inter la demandoj pri miaj impresoj el Bulgario oni kutime starigas la jenan: „Kio plej multe impresis vin dum la vojaĝo?“ Kaj mi senhezite tuj respondas: „La bulgara popolo, ĝia gastameco kaj rilato al la sovetaj homoj!“ Kaj vere sen la frata rilato al ni flanke de la bulgaroj, ni certe ne povus efektiviĝi la tutan nian programon.

Per la paĝoj de „Bulgara Esperanisto“ mi volas ege danki al ĉiuj miaj bulgaraj geamikoj, precipe al Pejo Peev kaj lia familio el u. Pazarĝik, al Dimitro Papazov kaj Angel Todorov el Sofio, al Tatjana kaj Nedko Nedev el Ruse, al Anton Antonov el Kubrat, al Stojan Matkârov kaj lia familio el Ĉeŝnigirovo, al Temenujka Ovčarova kaj ŝia familio el Etropole ka.

Koran dankon al vi, karaj neforgeseblaj geamikoj!

*Dmitrij Cibulevskij,
Marjkov, USSR*

*

Estimataj bulgaraj geamikoj, \

Mi volas danki pro la zorgoj kaj penado, kiujn vi manifestis dum la E-kongresoj en Veliko Tŕrnovo kaj Varno.

Mi, hungara e-isto, ne povas preterlasi la grandan gastamon de la bulgara popolo, ne rimarki dankoplene, ne memcii gratule la belajn arangojn de la kongresoj.

Aparte ĉiuj bulgaroj: e-isto kaj nee-isto egale, estis laŭdinde informemaj pri ĉiuj aferoj. Kelkfoje inter ili mi forgesis mian hungarecon kaj sentis min kiel hejme.

La bulgara popolo pruvis sian indecon je amo kaj estimo.

Mi salutis kaj tutkore dankas vin, karaj bulgaraj fratoj!

László Karlovics, Kõrmend

Subtenu bonan inciton! Ĉi-jare la siberia urbo Krasnojarsk (Sovetunio) festas 350-jaran jubileon de sia fondiĝo. Krasnojarskaj e-istoj deziras organizi grandan internacian ekspozicion de infanpentraĵoj dediĉe al tiu ĉi fama datreveno. La sukceso de la iniciato dependas de vi, karaj eksterlandaj geamikoj, de vi ĉiuj, kaj de ĉiu aparte.

Helpu al viaj gesamideanoj en Siberio: kolektu desegnaĵojn kaj sendu ilin al adreso: USSR, 660075 Krasnojarsk, ab/ja 2420, Esperanto-klubo.

Ĉiun sendinton ni informos pri la ekspozicio.



**SOLENA MALFERMO DE LA NOVA
LERNOJARO DE E-O**

La 2-an de oktobro en la ĉefurbo Sofio okazis granda solena malfermo de la nova lernojaro de E-o, organizita de la Sofia DE de BEA. En la salono de kulturdomo „Emil Sekerĝijski“ estis kelkcentoj da homoj.

Imponan prelegon je temo „La lingva problemoj kaj Esperanto“ faris prof. d-ro Stojan Ĝugev, membro de la Akademio de Esperanto. La riĉan belartan programon partoprenis la kanĥoro de la Asocio de Blinduloj kaj artistoj el Bulgara E-Teatro.

En la ĉefurbo jam ekfunkciis deko da E-kursoj por civitanoj, lernantoj, studentoj en la Universitato ka.

KUNVENO PRI LEV N. TOLSTOJ

La sofia esperantistaro celebris solene la 150-an naskiĝdaton de la titana rusa verkisto Lev Nikolaeviĉ Tolstoj. Ardan prelegon pri la vivo, konceptoj, verkaro kaj influo de Tolstoj sur multajn generaciojn de verkistoj faris Kunĉo Vălev — sekretario de BEA. Kun profunda kompreno kaj kritika prijuĝo pri la tiama epoko kaj pri la faktoroj, kiuj influis la verkaron de Tolstoj, la preleginto faris koncizan analizon de preskaŭ ĉiuj pli grandaj verkoj de la genia verkisto.

La prelego estis aŭskultata kun granda atento kaj fortaj emocioj.

Post la prelego Rajna Konstantinova legis la E-tradukon de la rakonto „Salto“, kaj Kunĉo Vălev tre artisme legis fragmentojn el la rakonto „Post la balo“, bonege tradukita de Asen Grigorov.

MULTJARA AMIKECO

Multjara amikeco ligas la e-istojn de Sumen kaj la e-istojn de u. Debrecen (Hungario). Ĉe ĉiu granda bulgara kaj hungara festo ni interŝanĝas salutleterojn. El Sumen al Debrecen estis senditaj materialoj por ekspozicio. Grupoj de e-istoj el ambaŭ urboj gastis unu al alia.

Nedelonge laŭ invito de siaj debrecenaj amikoj grupo de ŝumenaj e-istoj el E-societoj „Vekiĝo“ (urba) kaj „Progreso“ (en aŭtomobila fabriko „Madara“) vizitis Debrecenon. Ili partoprenis tritagan renkontiĝon lige kun la 20-jara jubileo de la loka E-societo. Jam ĉe la landlimo ili estis renkontitaj kiel plej karaj gastoj. Poste ili

ĉeestis en la solena kunveno kaj la koncerto, dediĉitaj al la jubileo. La hungaraj amikoj montris al la gastoj la vidindaĵojn de sia bela urbo. La gastoj estis aparte ravitaj, kiam antaŭ iliaj okuloj malfermiĝis la fama hungara stepo.

Tial la gvidanto de la grupo Vasil Georgiev, dankante al la dommastroj pro la varma gastigo, diris: „Karaj amikoj, ne sufiĉas la vortoj, per kiuj ni povus plene esprimi nian ĝojon, ke ni estas inter vi, ke ni konatiĝis kun via vivo kaj la pacaj socialismaj atingoj de la amika hungara popolo. Ni, la e-istoj, kontribuas por la reciproka interkonatiĝo de la ordinaraj civitanoj de niaj du urboj kaj landoj. Ni estas fidelaj amikoj laŭ ideoj, kaj ne estas forto, kiu povus nin disigi.“

Cvjatko Todorov

Dum la 63-a UK en Varno delegitaroj el la ĝemelaj distriktoj Târgoviște (Bulgario) kaj Eger (Hungario) okazigis komunan kunvenon. Tie ili pritraktis la problemojn pri kunagado kaj interhelpo por profundigi la amikecon inter niaj du popoloj, por plivastigi la aplikadon de E-o en la vivo kaj utiligi ĝin en la komuna porpaca batalo.

La delegitaroj akceptis unuanime la jenan amikeckontrakton:

AMIKECKONTRAKTO

inter distriktaj E-organizaĵoj de Târgoviște (Bulgario) kaj Eger (Hungario)

Ambaŭ organizaĵoj intencas plifirmigi kaj plivastigi la ĉiuflankajn kontaktojn por reciproka interkonatiĝo kaj interamikiĝo. Por tiu celo ili akceptis la jenajn formojn de kunagado:

1. Regula informado pri la jarplanoj de la organizaĵoj kaj ties plenumo.

2. Interŝanĝi informojn pri la sukcesoj de la popola mastrumo sur la vojo de socialisma konstruado.

3. Helpi la kontaktojn inter deivrsaj amatoraj kulturaj grupoj (turistoj, filatelistoj, fotoamatoroj ka.)

4. Organizati ekskursojn por reciproka gastado.

5. Organizati profesiajn grupojn por interŝanĝo de spertoj.

6. Instigi kolektivajn kaj individuan korespondadon de e-istoj.

PREZIDANTO de DE
de BEA en Târgoviște
(D. TODOROV)

PREZIDANTO de DE
de HEA en Eger
(E. KONCÖL)

Al Munkasszövetkezet „Thuri György“, Varpalota — Hungario

Kara kaj estimata estraro de Munkasszövetkezet „Thuri György“, ni jam estas hejme, sed neniam forlasos nin la impresoj el via belega kaj gastama lando.

Sur la paĝoj de „Budapeŝta Informilo“ kaj „Bulgara Esperantisto“ ni deziras esprimi per tiu ĉi letero nian koran kaj sinceran dankon pro via afabla gastigo kaj atento dum nia restado en Varpalota.

Dankon pro la favoraj kondiĉoj kaj fruktodonaj interparoj pri la akiraĵoj de via laborista kooperativo, de la ekonomia vivo en urbo Varpalota kaj de via ĉarma socialisma lando Hungario.

Nia vizito estis por ni kortuŝa momento en nia ĉiutaga vivo, ĉar ĉie ni estis akceptataj afable kaj atente, kiel kolegoj, kamaradoj kaj amikoj de unu socialisma komunumo.

Dum nia vizito en viaj vendejoj, gastejoj kaj en la vendejoj de la najbaraj kooperativoj en la ĉebalotona regiono kaj Budapeŝto ni spertis multon de via komerca agado, kiun ni deziras apliki en nia laboro.

La subskribita KONTRAKTO pri internacia amikeca paca kunlaboro inter niaj du kooperativoj estu ne nur papera formalaĵo, sed dank' al niaj komunaj klopodoj ni realigu ĝiajn celojn kaj taskojn.

Ni klopodu, ke la rilatoj inter niaj koope-

rativoj estiĝu modeio de vera internacia amikeco en la kooperativa movado.

Plejparte ni danku al la internacia lingvo E-o, kiu helpis la kreon de kondiĉoj por nia kontaktoj kaj de atmosfero por nia internacia amika kontrakto.

E-o kiel lingvo estas vere preferinda rimedo ĉe internaciaj kontaktoj. Neniu sentas ĝenata, neniu fieras, neniu ofendiĝas. La internacia lingvo E-o detale kaj klare esprimas ĉiun homan penson, en ĉiuj sferoj de la homa vivo.

Karaj geamikoj, ni konstatis, ke nia ideo estas favore akceptata kaj subtenata morale kaj finance de niaj ambaŭ landoj kaj pli altaj instancoj. Tion ni komprenis dum la akcepto de la Hungarlanda Kooperativa Unuiĝo fare de k-do Pál, sekretario de la Unuiĝo. Tian subtenon ni ricevas de nia Distrikta kaj Centra Kooperativa Unuiĝo en nia lando.

Ja nia paŝo farita en la internaciaj rilatoj pere de E-o estas unua ekzemplo, ekzemplo farinda kaj farenda.

Ankoraŭfoje koran dankon, karaj geamikoj de Laborista Kooperativo „Thuri György“!

Firman sanon kaj feliĉon al vi kaj sukcesplenan laboron por la konstruado de socialismo en via belega lando bondeziras

LA DELEGITARO DE „NARKOOP“ — KUBRAT, BULGARIO

Kubrat, la 25-an de aŭgusto, 1978

Prezidanto: Miĥail Ĉukov

LA CENTRA KOOPERATIVA UNUIĜO SUR INTERNACIA TERENO

La agado, kiun efektivigas la bulgara Centra Kooperativa Unuiĝo (CKU) estas ne nur grandega laŭ sia amplekso, sed ankaŭ tre varia laŭ enhavo — komerco, elaçetado de agrarmastrumaj produktoj, industrio, eksterkomerca agado, turismo ka. Ĉe vizito en la direkcio „Organiz-Amasa Agado kaj Internaciaj Rilatoj“ ni interesiĝis antaŭ ĉio pri la internacia agado.

La direktorino de tiu fako Vâlka Georgieva estis tre afabla dividi kun ni, ke la Centra Kooperativa Unuiĝo aktive laboras sur la internacia kampo kaj jam havas rilatojn kun kooperativaj organizaĵoj el 62 landoj. En ĉiuj internaciaj renkontiĝoj kaj iniciatoj ĝi defendas la demokratian principon en la kooperativa movado por ĉiufanka kunlaboro kaj paco.

Plej solidaj rilatoj estas starigitaj kun la kooperativaj organizaĵoj el la socialismaj landoj, membroj de la Konsilantaro por Ekonomia Interhelpo (KEI). Por tio eksterordinare multe kontribuas la subskribitaj

longedaŭraj kontraktoj kun apartaj landoj. Bonajn fruktojn donis la Memorando de la konsiliĝo de prezidantoj de centraj kooperativaj organizaĵoj el la landoj-membroj de KEI.

La reprezentantoj de CKU estas tre aktivaj en la laborgrupoj por solvo de diversaj problemoj kiel: modernigo de la komerco, elaçetado, personaro, kooperativaj informado kaj gazetaro, kemiaj kaj plastaj elaboraĵoj, ĉiutagaj priservoj, modo ka.

K-dino V. Georgieva substrekis, ke multaj kooperativoj en Eŭropo, Azio, Afriko kaj Latina Ameriko montras apartan intereson al la bulgara kooperativa agrarmastrumo kaj al la nuntempaj novaj formoj de organizo — la Agrarindustriaj Kompleksoj. Estas ankaŭ reciprokaj informiĝoj kun kooperativaj organizaĵoj el Anglio, Aŭstrio, Francio, Finnlando, Danlando, Norvegio kaj Svedio. Pli stabilaj rilatoj estas starigitaj kun la itala kooperativa organizaĵo „Lega Nazionale“. Ekzistas bonaj eblecoj por plua disvolviĝo de la kunlaborado kun ĝi.



Paralele kun la ĝenerala plibonigo de la interrilatoj de Bulgario kun ĝiaj sudaj najbaroj Grekio kaj Turkio, estiĝis ankaŭ konsiderinda aktivigo de la rilatoj en la kooperativa sfero. Estis interŝanĝitaj delegacioj inter la kooperativaj organizaĵoj. Tiel el la turka kooperativa organizaĵo „Kjoj-Koop“, krom la oficialaj delegacioj, estis akceptitaj fakuloj pri la kooperativa afero, kiuj instruis oranĝerian produktadon de legomoj, konigis la problemojn de sterkado ka. Turkaĵ kooperativanoj vizitis en nia lando la seminarion, kiun organizis la Internacia Kooperativa Unuiĝo.

Post la reveno de nia delegacio el Greklando, kie ĝi gastis al la tutgreka Konfederacio de Unuiĝoj de Agrarkooperativoj, malfermiĝas novaj perspektivoj por subskribo de kontraktoj en reciproka intereso.

Plivastiĝas la rilatoj de CKU ankaŭ kun la kooperativaj organizaĵoj en la evoluantaj landoj. En ĝia kooperativa kursejo ĝis nun estis instruitaj 282 kooperativaj agantoj el arabaj landoj. Pro kreskanta aŭtoritato de la kursejo kaj pro pliatiganta intereso al ĝi fare de multaj kooperativaj organizaĵoj el aliaj landoj, ekde la kuranta jaro la instruado plivastiĝas ankaŭ por parolantoj en angla, franca kaj portugala

lingvoj. Pri tiu ĉi kursejo kaj ĝenerale pri la disvolviĝo de nialanda produktadkooperativo interesiĝas ankaŭ la Organizaĵo por Industria Disvolviĝo ĉe la Unuiĝintaj Nacioj. La ĝisnuna praktiko montras, ke la bulgara kooperativa movado estas kaj povas esti ekzemplo por la kooperativaj organizaĵoj en multege da aliaj landoj.

La Centra Kooperativa Unuiĝo klopodas ankaŭ utiligi la internacian lingvon E-o por popularigi sian diversspecan agadon. Jam estas eldonitaj kelkaj broŝuroj en E-o. Baldaŭ aperos broŝurforme lekcio de prof. Ivan Lucov — „Konstruado kaj evoluado de la agrikulturaj laborkooperativoj en Popola Respubliko Bulgario“. Mi esperas, ke ĝi trovos bonan akcepton inter la e-istoj el ĉiuj landoj.

Dank' al la atingita malstreĉeco en la internaciaj rilatoj kaj estigo de spirito de interkompreniĝo kaj kunlaboro post la Fina Akto de Helsinki, ekzistas pli favoraj eblecoj por aktiva agado de CKU sur la internacia tereno. Ĝia estraro klopodas, ke tiuj eblecoj estu realigitaj. Ni preparas nin por aktiva internacia agado dum 1979.

*La konversacion gvidis
D. Mutuŝev*

Metodika demando

ĈU 100 LERNOHOROJ SUFIĈAS?

En nia lando la 15-an de septembro komenciĝas la lernojaro por la bulgaraj lernantoj kaj studentoj. Ekde la 1-a de oktobro komenciĝas la lernojaro de E-o por ĉiuj.

Ĉi tie mi dezirus tuŝi nur unu demandon ligo kun la nova lernojaro. Ordinare kiam parolas pri E-kursoj, oni subkomprenas la elementajn. Sed estas en niaj vicoj multaj e-istoj, kiuj finis elementan kurson de E-o kaj ĉesigis sian lingvo-lernadon. Al tiuj samideanoj oni devas turni apartan atenton kaj organizi por ili kursojn por progresintoj. Ĉu tiaj kursoj estas vere necesaj?

Verŝajne iu respondus: mi finis E-kurson antaŭ multaj jaroj. Nun mi legas kaj bone komprenas tion, kion oni parolas. Pro kio mi partoprenu novan kurson?

Aliaj dirus: mi jam estas maljuna, por mi ne plu estas necesaj kursoj.

Ĉu ili pravas?

Pasintan lernojaron ni, deko da e-istoj, regule partoprenis kurson por progresintoj, sperte gvidatan de Simeon Hesapčiev.

En n-ro 6/1978 de „Bulgara Esperantisto“ aperis artikolo pri tiu ĉi kurso sub titolo „Lingva perfektigo dum 100 instruhoroj“ de nia samkursano Pavel Hârlov. La artikolo tre bone pruvas la necescon de la kur-

soj por perfektigo. La aŭtoro de la menciita artikolo donas ĝustan respondon: „Por ni estas klare, ke la regado de E-o postulas seriozan kaj seninterrompan laboron.“

Dum 100 instruhoroj ni multe ellernis, multon ni eksciis, multon ni enmemorigis. Sed ĉu ĉio ĉi sufiĉas? Laŭ mi, multo ne signifas finon. Finon ni neniam atingos. Ĉiu lingvo havas subtilaĵojn. Tio validas ankaŭ por E-o. E-o estas lingvo facila, sed facila kompare kun la aliaj lingvoj. Tamen komencante lerni ĝin pli detale, oni malkovras multajn lingvajn specifaĵojn. Tiujn specifaĵojn oni povas ekregi pli bone en kurso por progresintoj.

Krome, ne sufiĉas koni la gramatikon de la lingvo. Oni devas posedi la lingvon parole. Kaj la parolkapablon oni povas ekposedi nur en parolado. Por tio ne sufiĉas la kunvenoj, kie ordinare unu parolas kaj la publiko aŭskultas. Perfektigi sian parolkapablon de E-o oni povas plej bone en kurso.

La kurso devas esti organizita konforme al la nivelo de la kursanoj. En unu grupo por progresintoj devas partopreni ne pli ol 15 personoj. Tiamaniere ĉiu kursano aktive laboros dum la lernohoro.

La instruformoj devas esti plej diversaj, variaj, kompreneble same laŭ la nivelo de la grupo. Jen kelkaj ekzemplaj formoj:

1. Rakonto laŭ bildo.
2. Rerakonto de interesa momento aŭ ĉapitro de libro. (En la menciita kurso sukcese estis uzata la romano „Sub la jugo“ de Ivan Vazov).
3. Rerakonto de esperantlingva artikolo, rakonto, sciigo ks. en E-o.
4. Rerakonto de artikolo, rakonto, sciigo ks. el E-o en bulgaran kaj el bulgara en E-on.
5. Konkiza rerakonto de la enhavo de:
 - a) libro en E-o;
 - b) bulgara libro en E-o.

Dao Anh Kha
uj tnama E-poeto

VOJAĜNOTOJ LIGE KUN LA 63-A

Iam, infano, mi ofte miris pri la vojo, kiu pasis preter mia vilaĝeto kaj perdis ie en la nekonata senlimo. Tiam kiel estus mi povinta esperi, ke iun tagon mia vojo iros al Sofio tra Moskvo kaj poste al Varno tra Târnovo! Nun ĉu mi devus danki al tia bonŝanco aŭ konscie rekoni la neceson de tiu zigzago de mia vivovojo?

Se oni neniam povus marŝi samtempe pli ol unu vojon, sekvi dumvive du malsamajn aŭ kontraŭajn direktojn, maltrankviligas mian penson jena enigmo: kiel hodiaŭ mi ne irus iun vojon alian ol tiun, kiu kondukas al Sofio tra Moskvo, por poste direktiĝi al Varno tra Târnovo?

Ekbrilas miaj okuloj pro la skarlataj tegmentoj kaj la modernaj konstruaĵoj kun iliaj ridetantaj kaj fieraj profiloj, reliefigantaj sur la blua firmamento. Freŝverdaj kampoj, valoj kaj montetoj etendas senfine siajn aromplenajn ejojn da buntaj rozoj, heliantoj kaj vinberoj, kiuj denove malkovrigas ĉe ĉiu paŝo de la povrulo, veninta el preskaŭ tute detruita lando. Survoje al Târnovo mi spiras je nova vivo, kvankam temporetroire mi pasas per la abismo de Sipka por atingi la mortorokon de Carevec.

Survoje al Târnovo ĉio rejunas ĉe ĉiu mia paŝo. Ĉu nur tial, ke tie bonvenigos min tute nova generacio, lumigata de hela verdstelo kaj de varma espersuno? Ne, la espero de la TEJO-anoj havus nenian eĥon, se ili ne trovus iun terlokon aŭ ĉielvolbon kiel sian taŭgan lulilon, iujn homojn kiel siajn bonajn partnerojn. Tie ĉi, en Târnovo, pulsadas en ĉiu minuto la korbatoj de bravega kaj humaneca nacio, impetiganta al reale radiant viva. Tie ĉi, en Târnovo, la antikva kaj la moderna, ĉio rejunas ĉe ĉiu mia paŝo.

Sekvadas min la poemdeklamoj de bulgara belulino kaj la kanzonoj de Veselin laŭlonge de la reloĵ kurantaj al la ondomuĝa

6. Tradukoj:

a) el E-o en bulgaran;

b) el bulgara en E-on.

7. Konkiza karakterizo de la herooj de rakonto, novelo, romano.

8. Interpreto de interparolo kaj parolado — buŝe — el E-o en bulgaran kaj inverse.

9. Verkado de artikoloj kaj rakontoj uzablaj en E-gazetoj.

Paralele kun tiu laboro oni devas diskuti ankaŭ pri lingvaj demandoj.

Do, tute klara estas la respondo de la demando, donita kiel titolo de tiu ĉi artikolo: Ne 100 instrueroj, sed multoble pli!

Šišman Bočev

kongresurbo. Estas kvazaŭ printempa arinsonanta super la murmura baso de paŝtoja droj kaj vekrioj, venintaj al mi el la alflanko de Nigra Maro. Tie ĉi dum arta vespero briladas en mi iu Venuso, kiu sendube anoncas kaj rapidigas la venon de sunoriĉa aŭroro. Kaj ĉiumatene, post vekigo, mi retrovas sur la plaĝo diversajn naciecojn nudabruste kaj nudakore apudesti sub la sama suno, aŭskultante la saman kanton de ondoj kaj ventoj.

Mi neniam miras, ke en Varno la verdulara revo ĉiutage fariĝas realaĵo. Tiu pacema kaj liberama popolo, fakte pli ol kvarmil kvincent el pli ol kvindeko da landoj, jam interamikiĝas per sama lingvo kaj universale kongresas, kiel procesio da profetoj fronte al la murdistoj kaj armilvendistoj de nia tempo.

„Vivu la stel’! Vivu la stel’!“ Tra la homplenaj stratoj antaŭ mi flirtadas tiu verda stel’, laŭtvoĉe kaj nerezisteble vokanta al homara harmoniigo. Sur la plaĝoj de Varno ĉiumomente, kiam mi tien venas, reaŭdiĝas ĝia bela melodio en la vastega kaj senfina kanto de ondoj kaj ventoj. Dek longajn tagnoktojn mi aŭdis la printempan arion super la murmura baso de paŝtoja droj kaj vekrioj, venantaj al Varno de tre fore, ne, de tre proksime, elflanke de lando frata kaj ĝemela, mia pacsoifa naskiĝlando.

Sofio, senĉese grandiganta, ŝajnas al mi ĉarma labirinto, kaj ĉiufoje vidante kaj penetrante ĝin mi ofte ŝatas sur trotuaroj erarvagi, kvazaŭ plenfida bebo trepidanta intervale en ambaŭ brakoj de sia vartistino. Kaj ĉiufoje, por retrovi mian vojon, mi denove serĉas bulvardon „Aristo Botev“ — he, ĉu ne la plej familiara vojo por mi, hajduto naskiĝinta en ĝangalo de Longa Kordilero — la alia baĉkanmontaro ĉe la orienta bordo de Pacifiko? Ĉiam mi



sukcesas rekoni ĝin, mian vojon en Sofio, ne nur pro tio, ke mi estas verda birdeto, devigata parkeri la revenon al sia nesto — Ĥristo Botev 97, tel. 31-00-29.

Ja en Sofio mi sentas min hejme, ĉar tie — same kiel en Târnovo kaj Varno — mi povas ĝissate paroli nian mirindan lingvon, en ĝi kanti, maksimi kaj rimi. Sed precipe kaj nur en Sofio, sur la kvietaj kaj meditemaj trotuaroj mi aŭdas sennombrajn konfesojn, ĉu vortajn, ĉu senvortajn, de miloj da bulgarioj ĉiuhore cirkulantaj preter la eterna domo de Georgi Dimitrov. Inter tiuj mi havis la plezuron ekscii tre gloran historion de bulgaro, nomata Ĥristo Gorov, kies portreton kaj biografion mi vidis sur iuj gazetpaĝoj okaze de lia 70-jara jubileo. „Jen nia asocia prezidanto“, klarigas mia kolego Kunĉo, kiu poste, cedante al mia in-

sisto, per plej simplaj vortoj rakontis al mi pri sia malriĉula deveno kaj luktoplana vivo. Ah, mi ne plu povis rekoni lin, tiun mizerikorde frakaseblan knabeton de l'iamo, en la nuna sekretario de BEA, kiu firmiĝas gvidas min tra Sofio kaj Bulgario, kun siaj ĉiam ridetanta vizaĝo kaj ŝultroj kliniĝintaj antaŭen, kvazaŭ donante al mi bildon de aglo sur sia senfina flugvojo.

Mi forlasas Sofion, unuafoje konatiĝinte kun la simpleco kaj simpatio de Ĥristo Gorov mem. Mi forlasas lin kaj Bulgariion, la antikvan kaj la modernan, kun la plena konvinko, ke post unu, du aŭ dek kvinjaraj planoj ĝiaj, se mi ankoraŭfoje revenos la urbon kaj erarvagos, mi ĉiam sukcesos rekoni ĝin, mian propran vojon, en Sofio.

Aŭgusto de 1978

64-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Lucerno (Svislando) 1979.07.28-08.04.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Adreso de LKK: Esperanto, Poŝtfako 14, CH-6512 Giubiasco, Svislando

EL OFICIALA KOMUNIKO n-ro 1

Protektos la Federacia Prezidanto. Alta protektanto de la 64-a UK estos d-ro Hans Hürlimann, nun federacia vicprezidanto de Svislando. Laŭ la svisa sistemo d-ro Hürlimann en 1979 fariĝos federacia prezidanto.

ISU en Lucerno. Enkadre de la 64 UK okazos la 32-a sesio de Internacia Somera Universitato. La ISU-Komisiono invitas universitatajn profesorojn kaj aliajn kvalifikitajn personojn sendi prelegproponon al ĝia sekretario, prof. S. Kawamura, 424-7 Kinasityō Huzii, Takamatu, 761 Japanujo. Proponojn en la necesa formo oni sendu al la sekretario ĝis la 15. I. 1979.

Belartaj Konkursoj alvokas. Ĝus aperis Antologio de la unua kvaronjarcento (1951—1975) de la Belartaj Konkursoj. Tiuj, kiuj volas eniri la antologion de la dua kvaronjarcento de BK, jam ekverku! La Belartaj Konkursoj akceptas originalajn verkojn en la branĉoj poezio, prozo, premio „Nova Talento“ kaj premio „Luigi Minnaja“.

Sekretario de la Belartaj Konkursoj estas d-ro Alec Venture, 7 Grosvenor Road, Wallington, Surrey SM6 OEG, Britujo. Detala regularo de la Konkursoj estas senpage ricevebla de la sekretario aŭ de CO de UEA.

Kongreskotizoj (en nederlandaj guldenoj):

- | | |
|--|-----|
| Kongresano ne membro individua de UEA. | 165 |
| 2. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro. | 143 |
| 3. Kongresano individua membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo | 110 |
| 4. Junulo ĝis inkluzive 20-jara | 50 |

- | | |
|--|----|
| 5. Plentempa studento ĝis inkluzive 30-jara. | 82 |
|--|----|

Loĝado laŭ ĉies buĝeto. La loĝtarifoj kredeble varias inter 92 kaj 96 svisaj frankoj. Temas pri 92 svisaj frankoj por unu nokto en unulita ĉambro kun banejo en luksa hotelo, kaj 96 svfr. por la tuta kongresa semajno (sep tranoktoj) en amasloĝejo! Oni povas esti ankaŭ en studenta loĝejo po 250 svfr. por la tuta semajno kun tri manĝoj tage.

IJK en Nederlando. La 35-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Austerlitz, intima vilaĝeto de la komunumo Zeist, Nederlando, de la 20-a ĝis la 27-a de julio 1979. Austerlitz situas en unu el la plej belaj ŝtataj arbaroj de la lando.

Kotizoj ĝis la fino de 1978 (en ned. guldenoj):

- | | |
|------------------------------------|-----|
| 1. Ĝis inkluzive 20-jara | 170 |
| 2. 21—25 jara | 190 |
| 3. 26—32-jara | 210 |
| 3. 33-jara aŭ pli | 235 |

Individuaj membroj de TEJO (t. e. individuaj membroj de UEA malpli ol 26-jaraj) subtrahu de tiuj kotizoj rabaton de 10 gld. La kotizo inkluzivas loĝadon, manĝojn kaj ekskurson.

Pri la pagmaniero oni konsultu la landan sektion de TEJO. Disponeblas nur 350 lokoj.

Temo de la 35-a IJK estos „Interŝtataj unuiĝoj — kiucele?“

La 35-a IJK fermiĝos frue vendrede, la 27-an de julio, por doni tempon atingi la 64-an UK en Lucerno.



Amas mi parolon dolĉan de bulgara junulino,
en vilaĝo altmontara amas mi pentrindan domon
kaj gracion rondodancon de bulgara dancistino,
kaj de floroj Roza-Valaj la belecon kaj aromon.

Amas mi la praarbarojn, rifuĝejojn de luktantoj,
amas la revoluciajn versojn de la Botev-kantoj,
amas la heroojn, kiuj falis en la sangbataloj,
kaj la tombomonumentojn en montaroj kaj en
valoj.

Mi kliniĝas antaŭ Levski kaj Vapcarov kun
admiro,
antaŭ ĉiuj pereintoj por la liberec' bulgara.
Serĉu ĉie — vi nenie trovos landon tiel karan...
Ho, mi amas vin, bulgara lando, el la tuta koro!

Memore al la forpasinta amiko Rudi Graetz,
iniciatinto de tiu ĉi artikolo, ĝin dediĉas

S. N. Podkaminer

LA OKTOBRA REVOLUCIO KAJ LA RUSA E-MOVADO*

La 60-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio en Rusio estis festata ne nur de la sovetiaj kaj socialistlandaj popoloj, sed de la tuta progresema homaro. La revolucio fariĝis turnopunkto de la monda historio: fondiĝis la unua en la mondo socialisma ŝtato, kiu malfermis novan epokon, la epokon de likvido de la privata posedaĵo je produktiloj kaj fino de ekspluatado de homo fare de homo. La revolucio naŝkis fortan reeĥon ĉe ĉiuj subpremitaj nacioj, klasoj kaj rasoj, trovintaj en ĝi bazon por sia liberiga lukto. Ĝi fariĝis standardo por ĉiuj, kiuj batalis por paco, kontraŭ la imperialismo kaj ĝia rabista politiko.

La revolucio alportis grandajn ŝanĝojn en ĉiuj vivosferoj de la popoloj, loĝantaj sur la teritorio de la iama cara rusa imperio.

Gravaj ŝanĝoj okazis en la rusa esperantista movado. Rusio estis la unua lando, en kiu antaŭ 90 jaroj aperis la lernolibro de E-o. Zamenhof, kaj lia familio loĝis sur la teritorio de Pollando, kiu tiutempe estis parto de la rusa imperio kaj la rusa lingvo estis gepatra por Ludoviko kaj liaj gefratoj. La pli ol modestaj monrimedoj de Zamenhof ne permesis al li eldoni samtempe pli ol unu lernolibron, kaj estas nature, ke tiu ĉi unua lernolibro estis ruslingva.

Tial estas kompreneble, ke la unuaj taĉmentoj de e-istoj aperis en la estinta cara Rusio kaj konsistis plejparte el rusoj kaj poloj. La apero de la lernolibro trovis fortan, kvankam ne vastan, reeĥon ĉe la,

rusa progresema inteligentularo (studentoj, kuracistoj ks), kiuj admire akceptis ne nur E-on, sed ankaŭ la humanecajn ideojn de Zamenhof lige kun la lingvo. La relative grandan disvastigon de E-o atestas la fakto, ke el 1000 ekzempleroj de la unua E-revuo, „La Esperantisto“, 600 estis abonitaj en Rusio. Kiam en 1895 pro aperigo en la revuo de la artikolo de Lev Tolstoj „Kredo kaj prudento“ la cara registaro malpermesis alvenon de la revuo en Rusion, tiu ĉi fakto starigis la ekzistopovon de la revuo kaj, certagrade, la movadon mem sur la randon de katastrofo.

Entute, la tiutempa E-movado en Rusio havis demokratecan karakteron kaj iom post iom evoluis, malgraŭ diversaj obstakloj kaj bremsoj fare de la cara registaro.

Alian karakteron havis la E-movado en la ĉefurbo Sankt-Peterburgo (poste Petrogrado). Ties E-organizaĵo, fondita en 1891; societo „Espero“, ludinta gvidrolon en la landa movado, estis estrata plejparte de homoj, apartenantaj al la privilegiaj tavoloj de la tiama socio: nobeloj, komercistoj, caraj oficiroj, altrangaj oficistoj, profesoroj. La disvastigo de E-o inter laborulaj amasoj staris ekster iliaj atento kaj intereso. Ili konsideris laboristojn kaj kamparanojn ne sufiĉe kleraj kaj kulturaj por kompreni la altajn ideojn de la esperantismo. Lige kun tio gravas noti diametre kontraŭan pozicion, kiun okupis Zamenhof rilate la rolon, kiun ludos laboristoj en la Movado. En 1910 en Germanio aperis unua en la mondo laborista E-revuo „Der Arbeiter Esperantist“. En la salutletero, sendita de Zamenhof al la redakcio, estas skribite:

„Verŝajne por neniu en la mondo, nia de-

* La artikolo estas verkita por «der esperantist», organo de Centra Laborondo Esperanto de GDR, de kie ni ĝin prenas.



„Verŝajne por neniuj en la mondo nia demokrateca lingvo havas tiun gravecon kiel por laboristoj, kaj mi esperas, ke pli-malpli frue ili fariĝos la plej forta subteno al nia afero. La laboristoj ne nur komprenas la utilon de E-o, sed ankaŭ pli ol iuj aliaj sentas la esencon kaj ideojn de l'esperantismo.“ (Leteroj de Zamenhof, volumo II, Letero n-ro 447).

La unua kongreso de la rusaj e-istoj en Peterburgo, en 1910, kiun ĉeestis Zamenhof, ne donis iujn principajn ŝanĝojn en la agado de „Espero“ kaj de kelkaj aliaj jam ekzistantaj tiutempe esperantistaj societoj en Rusio. Ili grupigis e-istojn plejparte bone posedantajn la lingvon, sed malproksimajn de la tiamaj seriozaj socipolitikaj problemoj.

La unua mondmilito fakte ĉesigis la evoluon de la rusa movado, kiu restariĝis post la februara revolucio en marto 1917.

Ektondris la bruego de la Oktobra Socialisma Revolucio. Estis renversitaj la fundamentoj de la rusia politika, ekonomia kaj socia vivo. Al la potenco de la nova ŝtato venis novaj, antaŭe subpremitaj fortoj. La adeptoj de la malnova reĝimo ne deziris libervole fordoni la potencon kaj ekstaris sur la pozicioj de la kontraŭrevolucio, sabotado, teroro. Apogante sin sur la financa kaj milita helpo de la eksterlandaj imperialistoj, ili organizadis kontraŭrevoluciajn, „brankajn“ armeojn en diversaj partoj de la lando, ĝoje salutis la militan intervenon de Anglio, Usono, Francio kaj Japanio. En la postfronto ili penis krei malordon kaj ekonomian kaoson.

Gravaj ŝanĝoj okazis ankaŭ en la rusa E-movado. La revolucio forigis ĉiujn obstaklojn, starigitajn de la carismo. Komenciĝis lavanga kaj spontana organizado de E-grupoj, kursoj, komitatoj kaj unioj en multaj dekoj da urboj, urbetoj kaj eĉ vilaĝoj. La novaj kontingentoj — laboristoj, kamparanoj, ruĝarmeanoj, lernantoj — senpere ligis la ideon de la Internacia Lingvo kun la ideoj de la socialisma revolucio en Rusio kaj ekster ĝiaj limoj.

En 1919 aperis la unua propaganda ruslingva broŝuro de Artjuŝkin-Kormilicin „Internacia lingvo de laboristoj kaj kamparanoj Esperanto“. En la provinco e-istoj komencis eldoni kelkajn revuojn — „Ruĝa esperantisto“, „Informbulteno“, „Steletoj“ ka.

Por karakterizi la ideojn, kun kiuj miloj da novaj e-istoj ligadis E-on, estas mencienda fakto el la vivo de la aŭtoro. Estante en 1920 studento, li kun grupo de siaj samkursanoj volontule aliĝis al la Ruĝa Armeo por kontraŭbatali la intervenintojn kaj „blankulojn“. En la bataliono, en kiu li militservis, estis politika gvidanto, malnova laboristo de granda metaluzino. Iufoje, dum batalinterrompo, li demandis la aŭtoron: „Ĉu vi aŭdis ion pri Esperanto?“ Ricevinte malklaran, iom skeptikan respondon, li

ekkriis: „Hontu, vi ja estas studento-intelektulo! Kial vi ne komprenas, ke kiam ni frakasos la kontraŭrevoluciulojn kaj forĵetos la intervenintojn, ni iros okcidenten, por helpi niajn fratojn, laboristojn, liberiĝi el la kapitalisma jugo? Kaj kiulingve ni interkompreniĝos? Ja laboristoj nenie posedas aliajn lingvojn. Krom la gepatrajn, ili ja ne havis instruistojn kaj guvernistinojn hejme, kiujn havigis al siaj infanoj la nobelaro kaj burĝaro. Kaj, jen Esperanto estas lingvo de la tutmonda proletaro, helponta nian definitivan venkon!“ Tiuj ĉi vortoj de neklera homo, sed fama revoluciulo gravuriĝis en la memoro de la aŭtoro, kaj tuj post la fino de la intercivitana milito li aliĝis al la petrograda societo „Espero“. Tiu ĉi societo, ludinta gvidan rolon en la rusa E-movado, ŝajne devus konservi tiun ĉi rolon en la atmosfero de la postrevolucia granda progreso kaj entuziasma disvolviĝo de la Movado de mal-supre, fariĝi ĝia centro. Sed okazis io tute kontraŭa. Same kiel la burĝaro kaj la burĝa intelektularo, la esperantistoj de „Espero“ estis certaj, ke la socialisma revolucio fiaskos en la plej proksima tempo, ĉar laboristoj kaj kamparanoj „ne kapablos gvidi la ŝtatan administradon kaj ekonomion“, kaj sub la frapoj de la kontraŭrevoluciaj armeoj kaj la intervenintoj la socialisma ŝtato estos renversita kaj ĉio revenos al la „normala“ burĝa sociordo.

Estas interese menciigi unu karakterizan epizodon. En Petrogrado, en multaj loĝejoj de la burĝaro kaj nobelularo oni kaŝis provizon de nutraĵoj por pliprofundi la malsaton de la loĝantaro, kaj armilojn destinitajn por planitaj ribeloj. Laŭ ordono de la soveta registaro grupoj de laboristoj, soldatoj kaj maristoj faris traserĉadon en suspektindaj domoj. La eksterlandaj ambasadorejoj kaj konsulejoj disdonadis al la eksterlandanoj, loĝantaj en Petrogrado, speciale presitajn „Gardfoliojn“ kun flagoj de la koncernaj ŝtatoj. Sur la folioj estis presite: „Ĉi tie loĝas eksterlanda ŝtatano. Lian loĝejon oni ne rajtas traserĉi.“

Tiuj ĉi ruslingve skribitaj folioj estis alkroĉitaj sur la enirpordoj. La estraro de „Espero“ preparis similajn foliojn kun verdaj flagoj kaj steloj kaj surskribo: „Ĉi tie loĝas esperantistoj ktp.“ Tiujn ĉi foliojn oni vendadis por sufiĉe alta prezo. La aranĝo havis sukceson kaj baldaŭ multaj neesperantistoj — diversaj suspektindaj personoj, inkluzive la komplotintoj, fariĝis amasaj aĉetantoj de la folioj. La estraro de „Espero“ pligrandigis la eldonkvanton kaj triobligis la prezon, ricevante konsiderinde grandan profiton. Estas klare, ke en tia animstato, la estraranoj de „Espero“ eĉ ne pensis pri iu helpo al la tutlanda E-movado: ilia sola taktiko estis trankvile atendi la

ŝajnantan al ili baldaŭan forigon de la so-
veta potenco.

La iniciaton por ordigo de la amasa mo-
vado prenis sur sin malgranda grupo de
esperantistoj-komunistoj. Ili kreis en 1920
organizaĵon „Eski“ („Esperantista Sekcio
de Komunista Internacio“, poste transfor-
mitan en „Esperantista Komunista Inter-
nacio“). La estraro de „Eski“ (Ergeski) kon-
sistis el e-istoj Drezen, Ort Sunnam kaj
Oĥitoviĉ. Ili publikigis Deklaron kaj kel-
kajn cirkulerojn, direktitajn al unuigo de
ĉiuj progresemaj e-istoj en la lando. Bal-
daŭ en multaj urboj aperis ESKI-grupoj.
Por la estraro de ESKI estis klare, ke rela-
tive malgranda grupo de esperantistoj-
komunistoj ne povas preni sur sin organizadon
kaj gvidadon de la ĉiutage kreskanta mo-
vado. Necesis kunvoki tutrusian E-kongre-
son kaj fondi tutsovetian organizaĵon.
De la soveta registraro venis arpo de tiu
ĉi iniciato. Estis konstatite, ke la plej
taŭga loko por la kongreso estas Petrogrado,
kie malgraŭ malamika pasiveco de la estraro
de „Espero“ ekzistis kelkaj junaj, energiaj
kaj progresemaj e-istoj. Ili komprenis, ke
sen forigo de la funkcia estraro neniu
arangoj en Petrogrado estas eblaj. Helpo
venis de esperantistoj — politikaj elmi-
grintoj el burĝaj Estonio kaj Latvio, kiuj
tutdis E-on en la malliberejoj de tiuj ĉi

ŝtatoj kaj nunmomente lernis en petrograda
komunista universitato, portanta la nomon
de la pola revoluciulo Marĥilevski. Tio estis
kamaradoj Ranca, Kalinka, Salo, Peto-
Vinkel ka. Laŭ ilia iniciato pli ol 60 ge-
studentoj fariĝis membroj de la societo.
La progresema anaro ricevis grandan pli-
multon. Estis elektita nova estraro, kies
unua paŝo estis la aktiva preparado de la
III tutrusia (la unua sovetia) E-kongreso.
La kongresan preparan komitaton eniris,
krom la suprenomitaj e-istoj, ankaŭ Bukov-
ska, la latva esperantisto Ĉaĉe, Mader,
Podkaminer kaj Teterin.

La 21-an de majo 1921 en la palaco de
iama granda princo (onklo de la caro)
okazis solena inaŭguro de la kongreso, kiun
partoprenis pli ol 200 e-istoj el la plej mal-
proksimaj regionoj de la lando. La kongreso
fondis Sovetrespublikan Esperantistan Unui-
ĝon (SEU), kiu baldaŭ fariĝis unu el la plej
grandaj kaj aktivaj esperantistaj organi-
zaĵoj en la mondo. SEU-komitatoj aperis
en ĉiuj sovetaj respublikoj, ĝiaj regionoj
kaj urboj. Estis eldonataj kelkaj revuoj
aperis multaj libroj — politikaj, beletraj, scien-
caj, vortaroj kaj diversaj lerniloj.

Malfermiĝis nova kaj brila paĝo en la
historio de la ruslanda esperantista movado,
al kiu donis vivon la Granda Oktobra So-
cialisma Revolucio.

KIO OKAZAS EN SOVET UNIO HODIAŬ?



*Pri tio vi havas blecon ekscii,
legante la ĉiusemajnan ĵurnalon «MOS-
KVAJ NOVAĴOJ», ldonatan angle,
arabe, fran e kaj hispane.*

*La ĵurnalo prezntas al siaj le-
gantoj plej fresajn informojn pri la de-
mandoj de la interna kaj ekstera poli-
tiko de USSR, pri novaĵoj de la kultu-
ra vivo, sciencaj atingoj, ekonomiaj
kaj teknikaj problemoj kaj aliaj okazoj.*

*En senpagaj aldonoj al la ĵur-
nalo estas publikataj plenaj tekstoj de
ĉiuj plej gravaj oficialaj dokumentoj de
la Soveta Ŝtato. Tiuj aldonoj aperas
ankaŭ en Esperanto. En n-ro 28/1978 kiel
aldono aperis plena teksto de la Kon-
stitucio de USSR, de kie ni prenas
fragmenton.*

*Aboni la ĵurnalon eblas ekde ajna dato kaj por ajna periodo. La abonojn akceptas fir-
maoj havantaj aerkontaktojn kun la tutsovetia firmao «MEĴDUNARODNAJA KNIGA».*

*Adreso de la redakcio:
USSR, Moskvo, str. Gorkij 16/2.*



KONSTITUCIO DE UNIO DE SOVETAJ SOCIALISMAJ RESPUBLIKOJ.

II. LA ŜTATO KAJ LA PERSONO

Ĉapitro 6.

CIVITANECO DE USSR.

EGALRAJTECO DE LA CIVITANOJ

Artikolo 33. En USSR estas establita unueca unia civitaneco. Ĉiu civitano de unia respubliko estas civitano de USSR.

Kialoj kaj proceduro de akiro kaj perdo de la soveta civitaneco estas difinitaj en la Leĝo pri la civitaneco de USSR.

La civitanoj de USSR eksterlande estas defendataj kaj protektataj fare de la Soveta ŝtato.

Artikolo 34. La civitanoj de USSR estas egalaj antaŭ la Leĝo sendepende de la deveno, socia kaj poseda stato, rasa kaj nacia aparteno, sekso, klero, lingvo, rilato al religio, speco kaj karaktero de okupo, loĝloko kaj aliaj cirkonstancoj.

La egalrajteco de la civitanoj de USSR estas garantiata en ĉiuj sferoj de ekonomia, politika, socia kaj kultura vivo.

Artikolo 35. La virino kaj la viro havas en USSR egalajn rajtojn.

Efektivigo de tiuj rajtoj estas garantiata per disponigo al la virinoj de egalaj kun la viroj ebloj en ricevo de klero kaj profesia lernado, en la laboro, en rekompenco pro ĝi kaj en labora avancado, en la soci-politika kaj kultura agado, kaj ankaŭ per specialaj rimedoj por defendo de laboro kaj sano de la virinoj; per kreado de kondiĉoj, ebligantaj al la virinoj kunigi laboron kaj patrinecon, per jura defendo, per materiala kaj morala subteno de la patrineco kaj infaneco, inkluzive disponigadon de pagataj forpermesoj kaj aliaj privilegioj al gravedulinoj kaj patrinoj, kaj laŭŝtupan reduktadon de labortempo de la virinoj, havantaj malgrandaĝajn infanojn.

Artikolo 36. La civitanoj de USSR de diversaj rasoj kaj naciecoj havas egalajn rajtojn.

Efektivigo de tiuj rajtoj estas garantiata per politiko de ĉiuflanka disvolvo kaj interproksimigo de ĉiuj nacioj kaj popoloj de USSR, per edukado de la civitanoj en la spirito de soveta patriotismo kaj socialisma internaciismo, per eblo uzi la gepatran lingvon kaj lingvojn de aliaj popoloj de USSR.

Kia ajn rekta aŭ nereakta limigo de rajtoj, establo de rektaj aŭ nerektaj avantaĝoj de civitanoj laŭ rasaj kaj naciaj kriterioj, same kiel ajna predikado de rasa aŭ nacia ekskluziveco, malamikeco aŭ neglekto — estas punataj laŭ la Leĝo.

Artikolo 37. Al eksterlandaj civitanoj

kaj al personoj sen civitaneco en USSR estas garantiataj antaŭvidataj de la Leĝo rajtoj kaj liberecoj, inkluzive la rajton turni sin al juĝistaro kaj aliaj ŝtataj organoj por defendo de apartenantaj al ili personaj, posedaj, familiaj kaj aliaj rajtoj.

Estantaj sur la teritorio de USSR eksterlandaj civitanoj kaj personoj sen civitaneco devas respekti la Konstitucion de USSR kaj observi la sovetajn leĝojn.

Artikolo 38. USSR disponigas rajton de azilo al eksterlandanoj, persekutataj pro defendo de intereso de laboruloj kaj de la pacafero, pro partopreno en revoluciaj kaj naciliberiga movado, pro progresiva soci-politika, scienca aŭ alia krea agado.

Ĉapitro 7.

LA ĈEFAJ RAJTOJ, LIBEROJ KAJ DEVOJ DE LA CIVITANOJ DE USSR

Artikolo 39. La civitanoj de USSR posedas la tutan plenan de soci-ekonomiaj, politikaj kaj personaj rajtoj kaj liberecoj, proklamitaj kaj garantiitaj de la Konstitucio de USSR kaj de la sovetaj leĝoj. La socialisma reĝimo garantias plivastigon de la rajtoj kaj liberecoj, kontinuan plibonigon de la vivkondiĉoj de la civitanoj agorde kun plenumo de la programoj de la soci-ekonomia kaj kultura evoluo.

Uzado de la rajtoj kaj liberecoj fare de la civitanoj ne devas damaĝi la interesojn de la socio kaj ŝtato, la rajtojn de aliaj civitanoj.

Artikolo 40. La civitanoj de USSR havas la rajton pri laboro — tio estas, pri ricevo de garantiita laboro, pripagata konforme al ĝia kvanto kaj kvalito, kaj ne malpli ol establita de la ŝtato minimumo — inkluzive la rajton pri elekto de profesio, speco de okupo kaj laboro, responde al inklino, kapabloj, profesia nivelo, klero kaj kun konsidero de la sociaj bezonoj.

Tiu rajto estas garantiata per la socialisma sistemo de mastrumado, per konstanta kresko de la produktantaj fortoj, per senpaga profesia instruado, per altigo de labora kvalifiko kaj per instruado pri novaj specialecoj, per disvolvo de sistemoj de profesia orientiĝo kaj laborinstalado.

Artikolo 41. La civitanoj de USSR havas la rajton pri ripozo.

Tiu rajto estas garantiata per fikso por laboristoj kaj oficistoj de laborsemajno, ne superanta 41 laborhorojn, per reduktita labortago pri certaj profesioj kaj industri-fakoj, per reduktita labortempo dumnokte;



per disponigado de ĉiujraj pripagataj forpermesoj, de tagoj por ĉiusemajna ripozo, kaj ankaŭ per plilarĝigo de kultur-kleriga kaj saniga instituciario, per disvolvo de amasa sporto, korpokulturo kaj turismo; per kreado de favoraj ebloj por ripozo en la loĝloko kaj aliaj kondiĉoj por racia uzado de libera tempo.

La daŭro de labortempo kaj ripozo de kolĥozanoj estas reguligata pere de kolĥozoj.

Artikolo 42. La civitanoj de USSR havas la rajton pri sanprotekto.

Tiu rajto estas garantiata per senpaga kvalifikita medicina helpo, donata de la ŝtataj sanprotektaj institucioj; per larĝigo de instituciario por kuracado kaj plisanigo de la civitanoj; per disvolvo kaj perfektigo de sekurectekniko kaj labora sanitarco; per efektivigado de vastaj profilaktaj aranĝoj, per entreprenoj por sanigo de la ekstera medio; per speciala zorgado pri la sano de la kreskanta generacio, inkluzive malpermeson de infana laboro, ne ligita kun lernado kaj labora edukado; per plilarĝigo de sciencaj esploroj, direktitaj al prevento kaj malpliigo de malsaniĝado, al garantiado de plurjara aktiva vivo de la civitanoj.

Artikolo 43. La civitanoj de USSR ha-

vas la rajton pri materiala asekuro dum maljuneco, okaze de malsaniĝo, de plena aŭ parta perdo de laborkapablo, kaj ankaŭ okaze de perdo de la nutranto.

Tiu rajto estas garantiata per socia asekuro de laboristoj, oficistoj kaj kolĥozanoj, per subvencioj pro provizora labormalpovo; per pagado je konto de la ŝtato kaj de kolĥozoj de pensioj pro aĝo, invalideco kaj okaze de perdo de la nutranto, per laborinstalado de civitanoj, parte perdintaj la laborkapablon; per zorgo pri maljunaj civitanoj kaj pri invalidoj; per aliaj formoj de socia asekuro.

Artikolo 44. La civitanoj de USSR havas la rajton pri loĝejo.

Tiu rajto estas garantiata per disvolvo kaj protekto de la ŝtata kaj socia loĝeja fonduso, per kontribuo al la kooperativa kaj individua loĝkonstruado, per justa socia kontrolo distribuo de loĝareo, disponigata agorde kun efektivigo de la programo de konstruado de bonaranĝitaj loĝejoj, kaj ankaŭ per nealta pago pro la loĝejo kaj komunumaj servoj. La civitanoj de USSR devas zorgeme rilati al la disponigita al ili loĝejo.

(Daŭrigo en n-ro 12)

NI RECENZAS

RIĈENHAVA ALMANAKO

Unu el la plej elstaraj agantoj kaj veteranoj de la Soveta E-movado estas Andrej Rogov. Lia nomo ĝuas vastan konatecon pro lia energia diversflanka E-laboro. Rogov senĉese instruas la junularon, fruktdone partoprenas en la E-tendaroj. Li aktive, sprite kaj trafekontraŭatakas diversspecajn profanulojn kaj konfuzantojn, kiuj provas misinformi aŭ kompromiti unu ella plej valoraj pacamaj movadoj en la mondo — la esperantista.

A. Rogov plenumas altvaloran laboron eldonante interesajn literaturajn almanakojn. La lasta numero 13, antaŭ nelonge dissendita al aktivaj E-kluboj, aparte indas esti priskribita. Tradicie ankaŭ ĝi traktas demandojn el la historio, teorio kaj praktiko de la E-movado.

Fako unua de la almanako prezentas la gravan deklaron de la 30-a de oktobro 1973 j. pri kontakta agado de la Tutmonda Pacmovado kaj la Mondpaca E-Movado (MEM), subskribitan de la gvidantoj de ambaŭ movadoj Romeŝ Candra kaj Nikola Aleksiev.

En la dua historia fako la veterano N. J. Tupijanc proponas trafan periodigon de la E-movado, kaj la veterano S. Podka-

miner interese rakontas pri la unuaj jaroj de la E-movado ĉe ni tuj post la Oktobra Revolucio. Tiam eksterlandaj samideanoj vigle interesiĝis kaj salutis la Sovetian E-movadon pro niaj ĝojigaj sukcesoj. Samtempe Rogov enmetis du interesajn artikolojn el revuo „Esperanto“ de 1920 j. La ĵurnalisto A. Harkovskij rakontas pri la fama rusa komponisto Taneev, aŭtoro de E-himno, regule skribinta sian taglibron en E-o.

Adepto de la E-movado, la sciencisto el Tjumena regiono V. Sadurskij trovis en loka arkivo de 1910 j. korespondaĵon de loka socia aktivulo kun membro de la StataDumo (Parlamento): Tiam la Ministerio de Popola Klerigo kaj la Ministerio de Eksteraj Aferoj prezentis projektojn pri enkonduko de E-o en la programojn de mezlernejoj kaj en la praktikon de la diplomaciaj interrilatoj.

La veterano S. Izmajlov interese rakontas pri la amasa pasio de la soveta junularo al E-o dum la dudekaj jaroj. Interalie li citas tiajn aŭtoritatajn verkistojn kiel Nikolaj Ostrovskij, Miĥail Isakovskij ka., kies sentencoj iĝis tiam vaste konataj kaj forte influantaj la laborulojn. Kaj unu vere



surpriza novaĵo: la elstara militesploristo Nikolaj Kuznecov, heroo de Sovetunio, estis sperta kaj aktiva e-isto!

La legantoj de la almanako dankas al Andrej Rogov pro la 140 sentencoj de plej eminentaj verkistoj, sciencistoj kaj ŝtatagantoj el ĉiuj kontinentoj. Ĉi tiu trezorejo de la progresema homa menso prezentas ekskluzivan gravecon kaj intereson ne nur por e-istoj, kiuj devas bone memorfiksi ilin, sed ankaŭ por ĉiu ajn homo, sendepende de lia aĝo, kultura nivelo, socia kaj politika pozicioj. La ideo de paco, interpopola kompreniĝo kaj amikeco respeguliĝas trafe en la almanako. La sentencoj de Anatolij Lunaĉarskij kaj Ĵanoŝ Kadar apudas kun iliaj fotoportretoj.

Grandan intereson en la sovetia kaj alilanda esperantistaro elvokas la neordinara vivo kaj diversflanka agado de la blinda rusa e-isto Vasilij Eroŝenko. Kvarjara li iĝis tute blinda. Antaŭ li estis plene senĝoja perspektivo. Tamen hazarda feliĉa renkontiĝo kun la elstara rusa e-istino pedagogo A. Sarapova, veterano de nia Movado, helpis al li ŝanĝi esence sian vivojon. G. Armand-Tkaĉenko bone priskribas en la almanako tiun periodon de la vivo de Eroŝenko.

Same kiel la menciitaj artikoloj, grandan intereson vekas la originala provo de A. Rogov, titolita „Modelo de soveta esperantisto“. Li proponas „dek ordonojn“ por la

vera e-isto, kiuj verŝajne akordas kun la uondkonceptoj de la e-istoj-aktivuloj.

La ĉefdelegito de UEA en Sovetunio Boris Kolker partoprenas en la E-movado jam 20 jarojn. Ĉelkonscia aktivulo, li pri ĉiu jaro mencias, kion li faris kaj atingis.

La veterano P. Astafjev rakontas pri la diversflanka fruktodona agado de elstara veterano de la E-movado kaj la Sovet Armeo I. Lubjanovskij, kavaleriano de la glora marŝalo Budjonij dum la civila milito. Lubjanovskij estis talenta poeto kaj tradukanto de multaj verkoj de rusaj klasikuloj (sume 5000 poeziaj versoj, plejparte de Puŝkin).

Kelkaj artikoloj konatigas nin kun trafikaj poresperantaj artikoloj en ruslingva gazetaro. Notindaj estas ankaŭ kelkaj originalaj verkoj, poezie kaj proze, kaj la artikolo „Esperanto kaj la scienco“. Tri paĝoj enhavas kronikon pri gravaj eventoj en Esperantujo.

En la fako „Diversaĵoj“ estas prezentitaj du konkretaj planoj de kluba laboro.

La almanako estas penetrita de la nobla ideo de paco, interkompreniĝo kaj amikeco inter la popoloj. Aŭtoroj de la plejmulto da eseoj estas veteranoj de la soveta E-movado. Ili malavare transdonas siajn riĉajn sciojn kaj spertojn al la novaj sovetaĵaj generacioj. Dankon al ili! Sendube ĉiu leganto estos tre kontenta kaj dankema.

Sergej Krajnou

Bibliografia mencio

Aperis bulgarlingva kolekto de raportoj kaj sciencaj anoncoj, prezentitaj antaŭ la scienca sesio, dediĉita al la 60-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, je temo: „Oktobro kaj la nuntempa epoko“, eldonita de la Supera Pedagogia Instituto en urbo Ŝumen, 1977, pĝ. 215.

La presitaj artikoloj estas bulgarlingvaj escepte de la lasta, kiu sub titolo „Internacia solidareco“ (aŭtoro Canko Murgin) estas, tutece presita en E-o.

Bonan pluan sukceson sur tiu kampo!

La Redakcio de «BE»

ESPERANTO-NOVAĴOJ EL LATVIO

La ŝtata eldonejo de Latvia SSR „Liesma“ ĵus aperigis koloran ilustritan 24-paĝan turisman broŝuron pri la ĉefurbo de nia respubliko Rigo sub la titolo „La antikva Rigo“. Prezo 75 kopekoj.

*
Rekomenciĝis la E-instruado en Rigo. Ĉi-jare ni planis plivastigi la instruadon ĝis tri bazlokoj. Ekde la 1-a de oktobro ekfunkciis jam la tradiciaj E-kursoj ĉe la Domo de Instruistoj sub la gvido de A. Danovska. Por ruslingvanoj tie gvidas la kurson N. Berce. Ni planas lanĉi E-kurson ankaŭ por studentoj — ĉe la Ŝtata Universitato sub la gvido de A. Kalninŝ kaj A. Mivreneks.

Jam la duan jaron sukcese funkcias E-rondeto ĉe la Palaco de Pioniroj de Rigo sub la gvido de T. Bercis. Pasintjare la kursojn finis 20 lernantoj. Ĉi-jare la nombro de lernantoj duobliĝis — la instruado okazas jam en du grupoj — por komencantoj kaj por progresintoj. La rondeto serĉas kontaktojn kun similaj rondetoj tutmonde. Bonvolu skribi laŭ jena adreso (respondo certa!): USSR, Latvio, Riga, Palaco de Pioniroj, Esperanto-rondeto.

*
Nia aktiva samideano H. Skuja, E-poeto, iĝis laŭreato de Internacia Konkurso de originala poezio, kiu okazis en Trento, Italio.

T. Bercis



La Samarkanda E-klubo de Internacia Amikeco aranĝos grandan pripacan ekspozicion, kies ekspoziciaĵoj estu ricevataj pere de E-o. Ni esperas, ke la ĉiulandaj e-istoj pacbatalantoj helpos al ni en tiu ĉi grava entrepreno kaj sendos al ni konvenajn materialojn (salutleterojn, afiŝojn, flugfoliojn, deklarojn, rezoluciojn, librojn, desegnaĵojn, fotojn de porpacaj manifestacioj, kunvenoj ktp.). Sendinte al ni tiajn mate-

rialojn vi helpos al ni duoble: unue, propagandi pri la paco kaj amikeco inter la popoloj; due, pruvi la taŭgecon de E-o por tiu nobla celo.

Ni nepre respondos al ĉiu amik(in)o, kiu sendos al ni ekspoziciaĵojn. Anticipan korean dankon al ĉiuj!

Bonvolu sendi ĉion al adreso: ANATOLO IONESOV, SU-703000 Samarkando, ul. Sovetskaja 53, Uzbekistano, USSR }

PRI RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ FAMILIOJ

Antaŭ jardeko en Torun (Pollando) okazis la unua renkontiĝo de esperantistaj familioj kun partopreno de 50 personoj el 6 landoj. Depost tiam oni ne sukcesis organizi similan aranĝon, kvankam la nombro de la denaskaj e-istoj kreskis.

Kiel grandan signifon havas la uzo de E-o en la familio! Ni mencias nur la konkludojn de tiu unua renkontiĝo.

1. Pli bone estas instrui la lingvon denaske, ol komenci la instruadon kelkajn jarojn post la naskiĝo.
2. Plej ofte sufiĉas instrui samtempe du lingvojn — la gepatran kaj E-on. Sed se la gepatroj estas diversnaciaj, sentiĝas la neceso instrui tri lingvojn samtempe.
3. Familianoj konstante uzantaj la internacian lingvon konstatis, ke E-o plene

taŭgas por esprimi ĉion. Se iu havas mankojn tiurilate, sufiĉas nur pli detale ellerni la lingvon.

4. La infanoj, denaske edukataj en E-o, iom post iom fariĝas internaciistoj kaj havas pri la mondo iom alian koncepton ol siaj samaĝuloj edukataj nur pere de nacia lingvo.
5. Laŭ la prezentitaj konkretaj ekzemploj oni konstatis, ke la denaska kono de E-o faciligas la lernadon de aliaj lingvoj fare de la infanoj.

Do ĉio ĉi sufiĉas por kompreni: temas pri grava tereno de nia Movado, nepre necesas daŭrigi la renkontiĝojn de E-familioj.

Ernö Csiszár

H— 8100 Várpalota, Kulich 25/V/16

Libera Tribuno

Karaj amikoj,
Skribi al vi instigas min la artikolo de s-ano Geza Kurucz pri la „magia cirklo“ en via rubriko „Libera tribuno“ (n-ro 3/1978). Tiun artikolon mi ankaŭ trovis en „Budapeŝta Informilo“. La artikolo estas ege interesa kaj tuŝas sufiĉe gravan problemon de la E-movado. Sed mi pensas, ke s-ano Kurucz eliras de malĝusta pozicio, neglektante gravajn sociajn rilatojn kaj tial ankaŭ neĝuste konkludas. Tiu „magia cirklo“ fakte estas ĉeno de la kaŭzo-efiko-rilato: sen registara agnosko neniu amasa lernado, kaj inverse — sen amasa lernado neniu registara agnosko. Sed tiu rilato estas... malĝusta. Rigardante tra marksisma-leninisma lenso, mi vidas tute alian rilaton.

Fundamentaj en la socio estas la ekonomiaj (produktadaj) rilatoj kaj necesoj. Por la Internacia Lingvo tio signifas, ke:

- unue, la optimumigo de la produktiloj necesigas;
- due, la alta evoluo de ili en la kapitalisma kaj socialisma sociordo (vidu ankaŭ: S. Podkaminer, Socialismo kaj inter-

Al la redakcio de „Bulgara Esperantisto“

nacia lingvo, „Bulgara E-isto“, 10—11/1977) ebligas la aplikadon de internaciaj lingvoj. Al tio konformas bezonoj en la superstrukturo (batalo kontraŭ lingva kaj kultura imperiismo; socialisma integro ne nur ekonomia ktp.). Jen do ni havas la **kaŭzon**.

La **efikoj** de la bezonoj en la bazo kaj en la superstrukturo estas la instruado, lernado kaj propagando de internaciaj (fremd-) lingvoj kaj ties plej ekonomia kaj plej raciigita formo, la planlingvo (do E-o). En la praktiko estiĝas tri paralelaj kolonoj por la enkonduko de Esperanto:

- amasa aplikado de E-o;
- registara (sindikata, partia) interesiĝo pri E-o;

— scienca esplorado pri E-o, interlingvistiko, esperantologio. (Tiun trian punkton s-ano Kurucz tute pretervidas).

Tiuj tri kolonoj (aŭ efikoj) estas diverse fortaj en la landoj pro multaj sociaj kaŭzoj. La diversforteco laŭ mia opinio nun ege malhelpas la „bone agorditan kunlaboron“, proponitan de s-ano Kurucz.



La tri punktoj, montritaj de mi, efikas do paralele kaj kondiĉigas unu la alian, t. e. ili formas dialektikan unuon.

Do tute ne ekzistas trarompanda magia cirklo. Mi volas ankoraŭ atentigi pri la diskuto pri la „interna ideo“ en „der esperantist“. Laŭ unua rigardo tio estas tute alia problemo. Sed vere ambaŭ diskutoj (interna deo kaj magia cirklo) atestas pri la sama

malĝusta poziciigo de E-o. Ni devas rigardi E-on kiel parton de pli granda socia sistemo regata de difinitaj (kaj bone konataj!) leĝoj. E-o ja ne vivas el aŭ per si mem, sed kreskas el difinitaj sociaj kaj ekonomiaj bezonoj.

Kore salutas vin

Michael Lennartz

Verdaj steloj

Veselin Hanĉev

KANTO PRI LA PATROLANDO

Tie, kie Rila alte staras,
kie bluas maro en la for',
tie estas mia land' bulgara,
la plej kara lando al la kor'.

Tie bonodoras rozoj, greno,
akvoj brilas ĉie en la hel',
kaj je birdoj la arbaroj plenas,
kaj en steloj pompas la ĉiel'.

Se vi iros laŭ la vojoj blankaj
preter urboj kaj impeta roj',
homoj sur skafaldoj, en grenkampoj
vin salutos kore kaj kun ĝoj'.

Fortos vi kun tiuj homoj karaj,
kaj naskiĝos per si mem la kant'.
Ne ekzistas, Bulgario kara,
ie pli amata ol vi land'!

El la bulgara: Simananda

Maria Vakaŝinska

PERDITULINO

Paŝtante sin iu ŝafino postrestis el la ŝafaro kaj perdiĝis. Si longe serĉis la ŝafaron kaj nerimarkante eniris profunden en la arbaro. Subite renkontis ŝin la lupoj.

— Ha, ŝafinetol — li klakis per la dentoj. — Tuj mi formanĝos vin! Mi mortas pro malsato!

— Bone, Luĉjo, — milde respondis la ŝafino — ja mi vivas nur por ke vi manĝu min. Sed vidu, Luĉjo, kian mizeran aspekton mi havas.

Malpura, maldika, malsana mi estas. . . Ekde tri tagoj mi serĉas drog-herbojn kaj kuracakvon. Hodiaŭ mi trovis ilin. Baldaŭ mi resaniĝos kaj beligiĝos. Pro tio, Luĉjo, lasu min vivi almenaŭ du-tri semajnojn. Tiam venu kaj formanĝu min.

— Sed kie mi trovos vin tiam? — demandis la lupoj.

— Kie? — En la ŝafejo. Ĉar foje mi jam perdiĝis, oni donis al mi la eminentan nomon Perditulino. Kiam vi venos, ekkriu: „Perditulino! Perditulino!“ Mi ĉiam kuŝas rande de la ŝafaro. Tuj mi aŭdos kaj venos, tiam vi havos la plezuron manĝi min pli bela kaj grasa. . .

Antaŭsentante riĉan festenon, la lupoj konsentis kaj iris en la arbaron. Revenis Perditulino en la ŝafejon, sed jam ne plu kuŝis kiel ĝis nun — enrande, sed ŝovis sin en la mezon de la ŝafaro. Post tri semajnoj la lupoj haltis apud la ŝafejo kaj ekkriis:

— Perditulino-o-o! . . . Perditulino-o-o! . . .

Perditulino malfermis unu okulon, malfermis la alian, timvekita. La lupoj denove insiste kriegis:

— Perditulino-o-o! . . . Perditulino-o-o! . . .

— Aha, Perditulino jam estas meze de la ŝafaro, — flustris al si la ŝafino kaj leviĝis.

Ŝi iris al la hundoj kaj diris:

— Ŝaro. . . Murĝo. . . Kuregul. . . Rapide kuregul. . . La lupoj gorgpremos la ŝafaron!“



— Af. ... Af. ... — ekbojis la hundoj, flugante kiel sago al la lupo. Ili ĉirkaŭis ĝin kaj komencis ĉifi ĝian dikan pelton. Apenaŭ la lupo sukcesis savi sin kun disŝirita pelto kaj ekde tiam ne kuraĝis eĉ pensi pri la ŝafino kun la eminenta nomo Perditulino.

ŜTONA ARBARO

Natura unikaĵo — nur tiel oni povas nomi tiujn mirindajn ŝtonformaĵojn, kiuj troviĝas je 18 km okcidente de Varno, apud la ŝoseo al Sofio. De malproksime ili similas obeliskojn de antikva tempo aŭ ŝtoniĝintan praarbaron. Bulgaroj nomas ilin „Pobiti Kamani“ (Enbatitaj Ŝtonoj). La plimulto de ili staras unuope, sed estas ankaŭ tiaj, kies bazo disbranĉiĝas kaj formas grupon el 2—3 fostoj. La apartaj ŝtonfostoj estas altaj ĉ. 5—6 m kaj dikaj 2—3 m. Kelkaj similas vazojn, sur kiuj kreskas arbustoj kaj herboj. La ŝtonfostoj kelkloke formas grupojn — Centra, Slânĉevska, Sulĝicite, la Blinda Fonteto ka.

Aparte interesa laŭ formo kaj strukturo estas „Slânĉevska Grupa“, situanta 1 km oriente de v. Slânĉevo. Tri el tiuj ŝtonfostoj prezentas unikan kreaĵon de la naturo. Laŭ sia strukturo ili estas esence diferencaj. La unua konsistas el materialoj kun dimensioj de terpomo, la dua — el grajnoj kun grandeco de avelo kaj la tria havas verget-forman strukturon. Unu el tiuj fostoĵ similas kuŝantan kamelon, pro kio oni nomas ĝin „La Kamelo“.

Pri la geologia origino de la Ŝtona Arbaro estas multaj hipotezoj. Neniu tamen nekontesteble klarigas la devenon de tiu natura unikaĵo.

E-faldfolio

Trikoloran faldfolion en E-o eldonis E-societo „Ivan Vladkov“ kaj la Urba Komitato de Pacdefendo en Drjanovo. En ĝi estas donitaj malgrandaj skizoj pri la naskitaj en Drjanovo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ardaĵ e-istoj Vârban Genĉev, Ivan Vladkov kaj Botju Penev, pereintaj heroe en la batalo kontraŭ la faŝismo, por paco kaj amikeco inter la popoloj. La tekston akompanas fotoj de la tri fidelaj popolaĵ filoj.

Mallonga skizo rakontas ankaŭ pri la bela monta urbeto Drjanovo kaj ĝiaj eminentuloj.

Forpasis tute subite, pro akcidento, nia multjara E-aktivulo en Kazanlâk

Ivan Momĉev Stanev 65-jara

Multjare li laboris kiel kursgvidanto kaj organiza funkciulo por la triumfo de nia kara E-o.

Niajn kondolencojn!

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Borjanka Rajkova — str. Marko Ivanov 11, 5500 Loveĉ (25-jara, fraŭlino)

Cvetanka Ilieva, zavod „Balkan“, otdel „Kooperirane“, 5500 Loveĉ (kun ĉl pri ĉt)

Simeonka Vasileva — str. Boris Boev 23, IV et., 5500 Loveĉ (35-jara, fraŭlino)

Monka Majnova — kompleks Lenin, blok 107-a, vhod A, II et. 5500 Loveĉ (30-jara, fraŭlino)

Sevda Georgieva — 5500 Loveĉ, Melnicata (30-jara)

Cvetanka Boĵinova — str. Volov 27, 5500 Loveĉ (28-jara — en E-o, rusa, franca)

Georgi Penĉev — str. Ĥr. Kârpaĉev 79, 5500 Loveĉ (32-jara)

Cvetanka Borisova — kvartal Goznica, str. Ivan Vazov 25, 5500 Loveĉ (20-jara, flegistino)

Lilija Todorova — kvartal Goznica, str. Ivan Vazov 25, 5500 Loveĉ (23-jara, flegistino)

Genĉo Kolev Ĥristov — Goljamo Drjanovo, Starozagorsko (20-jara — kun ĉl, precipe kun Japanio, Italio, Jugoslavio, Rumanio)

Venko Kojĉev Dimov — str. „19 fevruari“ 33, 6100 Kazanlâk (21-jara, studento de elektrotekniko)

Dimitro Stoev — str. Sv. Nikola 67, p. k. 11, 9005 Varna (54-jara laboristo — fotoj, bk, esperantaĵoj)

Roza I. Nikolova — 2648 Dĵerman, Kjustendilsko (19-jara, tajpistino)

Elena As. Mavrova — str. Damga 12, 2600 Stanke Dimitrov (24-jara, instruistino).

Diversaj e-istoj en aŭtomobila uzino — teknikistoj, inĝenieroj, oficistoj — tutmonde pri ĉt kaj precipe pri profesiaj. Skribu al: KTA „Madara“, Dom na Kulturatora, Esperanto-Societo „Progreso“, 9700 Sumen, Bulgario.

Albena Georgieva Nikolova — str. D. Donĉev, vhod B, ap. 8/er. 4 — 9300 Tolbuhin.

Daniela Kirilova — str. T. Dimitrov 85, ap. I, 2300 Pernik (13-jara lernantino — pri muziko, bk, insignoj)



Ĉeĥoslovakio

Se vi volas korespondi kun e-istoj el Slovakio, sendu korespondanonceton al „Esperantisto Slovaka“, monata organo de Asocio de E-istoj en ĈSSR. Adreso de ties redaktoro: E. V. Tvarožek, Hodžova 1939/6, 911 01 TRENČIN, Ĉeĥoslovakio.

Hungario

Lábodi István, H-8900 *Zalaegerszeg*, Balaoni u. 2.

F-ino Paulusz Piroska, H-8900 *Zalaegerszeg*, Ságvási u. 21—23.

F-ino Horváth Ida, H-8900 *Zalaegerszeg*, Erdési u. 18.

F-ino Balogh Gabriella, H-8945 *Bak*, Kossuth u. 26.

Szabó Balázs, H-8900 *Zalaegerszeg*, Ságvási u. 21—23.

F-ino Ufuári Katalin, H-8900, *Zalaegerszeg*, Vasút u. 32.

F-ino Tuboly Erzsébet, H-8945 *Bak*, Kossuth u. 108.

Japanio

Imita Jumi — Ao-7-1335-26 Macubara-ŝl, Osaka 580 Japanio (15-jara lernantino)

Ohta Miĉie — Kire 4-8-16, Hirano-ku, Osaka-ŝl, 547 Japanio (16-jara lernantino)

Saeki Erika — Miyake-ĉo 546-6 Macubara-si, 580 Japanio (16-jara lernantino)

Mizobato Norikiko — Habikigaoka-miŝi 3-6-20, Habikino-ŝi, 583 Japanio (15-jara lernanto).

Se vi deziras korespondi kun japanaj e-istoj, sendu vian anonceton al la korespondaservo de JEI, indikante viajn aĝon, sekson, profesion, hobion kaj adreson preslitere, se eble aldonu foton. Adreso: Japania Esperanto-Instituto, Waseda-Mati 12-3, Sinzyuko-ku, Tokio 162, Japanio.

Kosta Rika

Marvin Segura — aptdo 1913, San Joŝe, Costa Rica, Centra Amerika (24-jara teknikisto)

Kuba

Membroj de E-rondeto en mezlernejo — kun gejunuloj el socialismaj landoj. Adreso: Esperanto-rondo, lernejo „V. I. Lenin“, Carrtera las Gansimas km 3½, La Habana, Cuba.

Rumanio

Membroj de E-rondeto — kun bulgaraj e-istoj pri ĉt. Adreso: Casa de cultura, 0425 Cimpuluny — Arges, Esperanto-Rondo.

Vajda Ioan — str. Dupa Iniste 44, 2200 Brasov (28-j. programisto de elektronaj komputiloj).

Pollando

Jrzi Kaczmarek — str. Bierutowska 2/50, 51-317 *Wroclaw* (24-jara — kun gebulgaroj, interŝanĝas bk, turismajn prospektojn)

Irena Wilk — Dzierzynskiego 2a/9, 39—300 *Mielec* (15-jara — kun gebulgaroj pri sporto, muziko, literaturo, gram. diskoj, pm)

Henryk Porowski — ul. Wroclawska 52/8, 45—701 *Opole* (22-jara instruisto — kun ĉl pri moderna muziko, sporto, turismo, pm, bk, gram. diskoj)

Elzbieta Salata — Kozia Wola 197, 26—220 *Staporkow*, woj. Kielce (17-jara — pri ĉt)

Janina Krzywiec — ul. 3 Maja 5/7, Pl-41-800 *Zabrze* (studentino — kun junaj gebulgaroj, reciprokaj vizitoj)

Danuta Parecka — ul. Brani 7/3, Pl-41-800 *Zabrze* (studentino — kun junaj gebulgaroj, reciprokaj vizitoj)

Roberto Wydornik — str. Felinskiego 13/24, 92—247 *Łódź* (16-jara — kun bulgaraj gejunuloj)

Matysiak Edward — str. Lartosa 42/1, 42-573 *Bedzin* (22-jara)

Stanisława Romaszkan — str. Debina 47, 05—152 p-ta *Czosław* (45-jara)

Grzegorz Moscinski — ul. Bydgoska 15 m 30, *Łódź* 91-036 (19-jara lernanto en teknika metallernejo — kun gebulgaroj: vojaĝoj, junulara muziko, bk)

Krzysztof Marcinkowski — ul. Bydgoska 15 m 10, *Łódź* 91-036 (20-jara lernanto — kun gebulgaroj: vojaĝoj, junulara muziko, bk)

Andrzej Pydys — ul. Bierutowa 18/82, 20—128 *Lublin* (21-jara — kun bulgaraj junulinoj: sporto, muziko, kino, teatro).

Sovetunio

Novaj e-stoj — kun ĉl pri ĉt. Skribu smase al: Dom Uĉitelja, Esperanto, Lenina 103, *Kaluga* — 248 600, USSR

Laimios Straznickas — 234 365 — *Stakliškes*, Prienu raj., Litovio, USSR (18-jara studento — kun ĉl pri mod. muziko, lingvoj, bk, pm). Respondo certa.

Boris Kolker — abonkesto 162, SU-450 025 *Ufa-25* (38-jara aktivulo de E-movado, ĉefdelegito de UEA, kun gebulgaroj, precipe el Varna)

Rimantas Rimkus — ut. Naŭjakemio 13—129, 235 815 *Klaipeda*, Litovio, USSR (17-jara lernanto — filmoj, muziko, libroj)

Marina Proĥorova — str. Ogorodnaja, d. 3—28, Ivanovo-34, 153034 USSR (18-jara studentino en industria lernejo)

Katja Prjaĥo — str. Volodarskogo, d. 32—21, Ivanovo—22, 153022 USSR (18-jara studentino en industria lernejo)

E-istoj el Moskva Universitato — tutmonde pri literaturo, muziko, lingvoj: Ira Kaljušina (18-j.), Marina Kulgavčuk (17-j.), Lena Alibova (20-j.), Svetlana Džuba (22 j.). Komuna adreso: USSR, Moskvo, pr. Vernadskogo 37, Komunloĝejo de MGU.

Esperanto-klubo en Universitato. Komuna adreso: 426 000 Iĵevsk, str. Marks, d. 403, kv. 51, Larisa Vorobjova.

Grupo de novaj e-istoj — tutmonde. Komuna adreso: Klevečkaite Giedra, Panevežis, Pilėnu 18.

Kursgvidanto kaj liaj gekursanoj: Krasnodar — 350 000, Centro, do vostrebovanija, Ivaskenok Anatolij Ivanoviĉ. !\

Kirilova Nataŝa — SU-399740 Lipeckaja obl., Eleck-13, str. Kommunarov 103, kv. 71 (instruistino de franca kaj germana — kun ĉel pri lingvoj, arto, muziko, turismo k. a.).

E-klubo, adreso: Svetlana Smetanina — ab. kesto 8, Ivanovo — Centro, 153 000 USSR (E-instruistino).

Fedosova G. — Satka-5, str. Proletarskaja 43-3 (28-jara, instruistino de germana lingvo, gvidantino de lerneja E-rondo).

Faizova F. — 456910 Satka 3, Ĉeljabinsk, str. Metalurgov 13-64 (gvidantino de E-kursoj)

Kolesnikov Aleksandro — Gogolevskij per. 3, kv. 3, 347900. Taganrog, Rostovskoj obl. (20-jara studento — pri sporto)

Katalina Kovaĉ — ul. Pobeda 295, Zakarp. ter. Raj. Beregovo, SU-295514 (17-jara studentino de medicino)

Ljubovj Kautkina — str. Samojlova d. 5—37, 153 003 Ivanovo-3 (17-jara studentino de kulturo)

Nataŝa Jakimova — str. Kukonkoviĉ d. 88—59, 153013 Ivanovo (18-jara studentino de kulturo)

Valerij Kokin — masiv Severo-Vostok 2, dom 88 kv. 54, Taŝkent 124, USSR 700124 (studento)

Tatjana Skok — Nelgi 24-1, Tallinn 12 (20-jara studentino)

Magda Kivistik — Angerja 13-77, Tallinn 4 (45-jara oficistino) !\

Diĥobaba Olga — proezd Sadovij 13-A, kv. 138, 310128 Harkov-128 (19-jara studentino)

Laimius Stražnickas — 234365 Stakliškes, Prienu raj., Litovio, USSR (20-jara studento — muziko, lingvoj, bk, pm — respondo certa)

Helve Reiljan — Kreutzvaidi 17—5, SU-200010 Tallinn (muzikistino — pri muzikpedagogio ka).

Ellen Riim — Tamsaare tee 119-34. SU-200029 Tallinn (telegrafoficistino kun sia 22-jara filino Ulle — pri ĉel)

Alar Kihu — Raudtee 47—1, SU-200016 Tallinn (18-jara lernanto—radiotekniko, filatelisto, pm)

Ene Pärnits — Kūlmallika 6—1, SU-200026 Tallinn (18-jara lernantino — muziko, lingvoj, bk, pm)

Mati Kröönström — Saha 46—18, SU-200009 Tallinn (13-jara lernanto — aŭtomodeloj, pm, moneroj)

Balandinu ĵeni — Bajkalskaja 28-a, Taltgar 2, Kazaha SSR, 483310 Sovetunio (15-jara lernanto — pm, insignoj, esperantaĵoj)

Stena Vasil — str. Geologiĉeskaja 3/3, Nikolaevka, Iliĉkij raj., Alma—Ata, Kazaha SSR (25-jara)

Svedio

Nils Johansson — Norrtullisgatan 23, 113—27, Stokholmo (pm)

Venezuelo

Leonel Marin — Rina de Marin, apartado postal 4845, Maracay — Edo Aragua

Fatima Serpa — Mansana 128 № 9 — villa Brasil Puetro Ordas, Edo Bolivar (15-jara)

Isabel Diaz — Barvio Andres Eloy Blanco S/U Tucupita, T. F. D. A.

Socrates Morales — aptd. 76626, Caracas 107 (studento de administracio)

Marcos C. Vasquez — bloque 11, Edif. 2, Piso 9, apto. 902, Sector UD7, Ruiz Pineda, Caricuao, Caracas (studento de inĝenieroscienco)

Vjetnamio

Chu-van-Binh — 188 Quoc-Lô I, Biên — Hoa, (23-jara fraŭlo — kun gebulgaroj).

Kim Hoang — 316/7 A rue Nguyen Văn Trôi, Hô Chi Minn ville (kun ĉel — muziko, bk, pm).

Respondo certa!

Estimataj gesamideanoj,

La esperantista klubo en Krasnojarsk estas nun unu el la plej aktivaj E-kluboj en Sovetunio. Ĝian (aktivularon formas studentoj, laboristoj, oficistoj, instruistoj, lernantoj. Ĉiuj 60 aktivuloj deziras korespondi. La klubo volonte subtenas kolektivajn kontaktojn kun eksterlandaj E-organizaĵoj. Ĉiu deziranto korespondi trovos en la klubo korespondamikon. Do, dezirantoj bonvolu skribi laŭ adreso: USSR, 660075, Krasnojarsk, abonkesto 2420, Esperanto-klubo.

La membroj de la Krasnojarska E-Klubo